**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 38

**Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Kiam kato promenas, la musoj ␣ ␣ **st** ␣ **n** ␣ ␣.

**2.** Ne fidu **h** ␣ **r** ␣ **d** ␣ ␣, fidu posedon.

**3.** La tri ĉefministrojn apogis ankaŭ la pola ĉefministrino Beata Szydło, kiu severe ␣ ␣ **nd** ␣ **m** ␣ ␣ ␣ nuntempajn malhonestajn komercajn praktikojn.

**4.** Krum venis en la fino de la printempo, renkontis avon Nestor kaj klarigis al li, ke oni **k** ␣ **m** ␣ **s** ␣ ␣ ␣ al li zorgi pri la monaĥejo.

**5.** Ni elektis ĉefon por ␣ ␣ **m** ␣ **nd** ␣, se estus necese batali por la vivo, kaj ni multe bezonis lian lertecon.

**6.** Se unu el celoj de E-kongreso estas ␣ **n** ␣ **t** ␣ **g** ␣ la lokan movadon al plia aktivado, oni povas diri, ke certe sukcesis la 2a Azia Kongreso, okazinta 22–25 aŭg. en Hanojo.

**7.** Laŭŝajne, la iom embarasita redaktoro ␣ ␣ **nf**␣ **z** ␣ ␣ min kun iu hungara matematikisto, kies nomo hazarde, kaj nekredeble (ĉar mi ne estas hungaro) similas mian.

**8.** Mi venis al mia loko, apud fenestro kun metala ␣ **r** ␣ **d** ␣ kaj kuŝiĝis sur la dorson, metinte la manojn sub la kapon kaj ferminte la okulojn.

**9.** Verŝajne linko nur suĉas la sangon, ĉar homan **k** ␣ **rn** ␣ ␣ ĝi ne manĝas.

**10.** La imposto povus trafi ne nur financajn, sed ankaŭ varajn borsojn, ĝi povus **v**␣ **r** ␣ ␣ laŭ la ekonomiaj cirkonstancoj kaj bezonoj.

**Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Spektinda filmo: estas bedaŭrinde nur, ke en kinejo oni povas uzi nur du el la kvin **s** ␣ **ns** ␣ ␣.

**2.** Januare de 1945 *Antanas Smetona*, kiu tiam nomiĝis *Korall* fornavigis el la haveno de Helsinko kaj trafinte **m** ␣ **n** ␣ ␣ dronis en la Finna Golfo.

**3.** Oni komencas esperi pri mirakla evoluo: falis la berlina muro, kial ne forfalus la **o**␣ **s** ␣ ␣ **k** ␣ ␣ ␣ al uzado de nia lingvo.

**4.** La kolero ne estas amiko de la justeco, kiel la **v**␣ **l** ␣ ␣ **r** ␣ ne estas amiko de la kolombo.

**5.** La nana sambuko aperas en la **k** ␣ **t** ␣ **l** ␣ **g** ␣ de irlandaj plantoj, eldonita de la estro de Botanikaj Ĝardenoj en Dublino.

**6.** En decembro 1999, en urbo Quimper, okazis **s ␣ l ␣ n ␣** inaŭguro de la renovigita katedralo, kun granda religia festo kaj koncertoj.

**7.** Supozata kalumniito procesanta kontraŭ ĵurnalisto devas nenion pruvi; male la ĵurnalisto pruvu, ke li nek **o␣ ␣ nd ␣ ␣**, nek insultis, nek kalumniis.

**8.** La patro de Janica Kostelić asertas, ke eblas fari el ajna sana infano, se oni fruaĝe sisteme **t ␣ ␣ jn ␣ ␣**, ĉampionon en ajna fako.

**9.** Multaj lernantoj de Esperanto havas grandan malfacilon **p ␣ ␣ n ␣ n ␣ ␣** aŭ distingi la sonojn c kaj sc (ekzemple, en “scii”, “sciuro”).

**10.** Mi mem vidis, ke en la teatro estis tiel malvaste, ke oni ne povis **a ␣ l ␣ ŭ␣ ␣** en horizontala direkto, sed en la vertikala.

**Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

trafik', formik', ark', balot', buĉ', ampleks', fuŝ', flat, instal', cindr'.

**1.** La **␣ ␣ k ␣ ␣ t ␣ ␣ ␣** akompanis ŝtonĵetilistoj, portantaj sakojn kun ŝtonoj kaj armitaj per mallongaj glavoj.

**2.** Sinjorino Breine estis laca de la bala muziko kaj vanila glaciaĵo, de amindumaj rigardoj kaj sengusta **␣ l ␣ ␣ ␣ ĵ ␣** de la frake vestitaj sinjoroj kaj naŭzaj salonparfumoj.

**3.** Dum la administrado de Lula **␣ ␣ ␣ ␣ ␣ k ␣ ␣ ĝ ␣ ␣** la monata ŝtata subvencio al malriĉegaj familioj je 14 milionoj.

**4.** Voĉdonanto ricevis du **␣ ␣ l ␣ ␣ ␣ l ␣ ␣ ␣** por indiki kandidaton kaj partion.

**5.** Bienistoj, kiuj ĉiuvespere en la televido prilamentas la sorton de siaj bestoj, kutime senpripense, senskrupule forsendas ilin al **␣ ␣ ĉ ␣ j ␣ ␣** kaj al morto.

**6.** La registaro disputas pri proponoj kiel solvi la problemon: ĉu per instalo de **␣ ␣ ␣ d ␣ ␣ g ␣ l ␣ ␣**, vastaj rubodemetejoj; redukto, apartigo kaj reutiligo de rubaĵoj; ĉu alie.

**7.** La kongresejo *Grad Mladih* troviĝas ene de la urbaj limoj de Zagrebo, atingebla en 30 minutoj de la centro per urbaj **␣ ␣ ␣ f ␣ ␣ ␣ l ␣ ␣**.

**8.** En mia epoko, do antaŭ 30 jaroj, mi bezonis **␣ ␣ ŝ ␣ l ␣ ␣** ĉe telefon-centralo por min averti pri subaŭskultado, hodiaŭ ni bezonas la moralan forton de Snowden.

**9.** Iutage en unu por ni malgranda **␣ ␣ ␣ ␣ ␣ k ␣ j ␣**, sed por formikoj granda formikŝtato, ekestis grandega kaoso.

**10.** La elektroprovizaj **␣ ␣ ␣ ␣ ␣ l ␣ ĵ ␣ ␣** en plejparto de la kamparaj regionoj estas malnovaj.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** En la Libroservo, kun la malferm-tage kutima ___ de 10%, vendiĝis varoj je 2317 eŭroj – i.a. ĉiuj disponeblaj titoloj de Marjorie Boulton.

**a.** profesoro **b.** insigno **c.** kontrolo **d.** rabato

**2.** Alico ne sciis kio estas ___, nek longitudo, sed ŝi opiniis ke ili estas tre elegantaj vortoj.

**a.** tramo **b.** kajero **c.** latitudo **d.** hundo

**3.** Mankas elektra ___ dum po 14 ĝis 16 horoj tagnokte.

**a.** kaĉo **b.** kranio **c.** violono **d.** kurento

**4.** Tio estis hela malgranda ĝardeno, en kiu oni kulturis aloojn, palmojn, oranĝarbojn kaj cedrojn en vazoj, ĉiuj estis ordigitaj en vicoj laŭ la kresko kaj en la mezo ŝprucis ___.

**a.** fontano **b.** planedo **c.** lukto **d.** komedio

**5.** Cent milionojn da jaroj poste, la oksigena elcento malaltiĝis kaj la organismoj, kies fosiliojn oni trovis ĉe la ___ Afriko, forsvenis.

**a.** enketa **b.** solena **c.** ekvatora **d.** klasika

**6.** Kelkaj specoj de termitoj konstruas tureton el tero, de alteco iom pli ol 50 ___, ĉirkaŭitan de elstaranta konusa tegmento, tiel ke la konstruo estas tre simila je fungo.

**a.** galoŝoj **b.** kompanioj **c.** centimetroj **d.** fungoj

**7.** Kaj nun rigardu la oficistojn: iliaj edzinoj portadas orajn ___ kaj orelringojn kaj tiel delikatajn vestojn, ke la princoj povus envii al ili.

**a.** hektarojn **b.** sandviĉojn **c.** salikojn **d.** braceletojn

**8.** Daŭra uzo de insekticido kondukas al rezisto ĉe damaĝ-insektoj kaj povas mortigi ankaŭ utilajn skarabojn, ___ kaj abelojn.

**a.** kalsonojn **b.** vespojn **c.** salatojn **d.** angilojn

**9.** Botelo da vino de la plej bona speco estis metita en la korbon de manĝaĵoj al la tie jam troviĝantaj ___, kolbaso kaj fromaĝo; apude kuŝis butero kaj plej bonspeca pano.

**a.** ampolo **b.** gumo **c.** sago **d.** ŝinko

**10.** La ŝtata imposto estu metata nur sur la netan rezulton de la agrikulturo, t.e. sur la ___, kiun la terposedantoj akiras farmigante la teron.

**a.** gudron **b.** anekdoton **c.** renton **d.** alarmon